

500–599 paŝoj – 18 baladoj

& El la kampana milito 1525:	278
& Major' Brak':	279
& Balado pri malalta formiko:	280
& Krioj de l' mizero:	282
& Mia nomo ne gravas:	284
& Dekdumejla arbar':	286
& Ĉiu vir' havis piedojn:	288
& Eta Mazgrev:	290
& La monten prenita:	293
& La kampulo kaj la korniko:	295
& Eŭropo:	297
& Iras abiturient'...:	299
& Infanoj de zorgo:	301
& Brulpereo:	303
& Konsiloj al malĝoja amikino:	305
& Signhild Fiera:	307
& La kripla Pegazo:	309

& El la kamparana milito 1525:

< Ripete 39 sed rekante 32 el 64 batoj por strofo, entute 512 paŝoj dum 5 minutoj. El germana tradukis N. B.>

(#Melodio:

<1,9:4> (

La /La aTi dodo rere /mi ifa mi h; /mi i la afa /mi h h; mi /re fafa
mi re /do Ti La a; /Ti i mi imi /La h h h;

(#Rekantaĵe: 2× /La ado mi h /fa la mi h /redo Tido re fa /mi mi
La h)

)×8)+

(& Strofoj:

'1 Ni /estas Gajerana /nigra
band', ; /heja o/ho! ; Ti/ranojn
forbatos /ni el land', ; /heja
o/ho!

(×: 2× /Al atak', /el bivak',
/Ruĝan kokon metu /ĉe l'
monak'.)

'2 Ni volas ĉe l' di-sinjor'
plendi, ; kirielejs, ; Ke ni
pastraĉon povu mortefendi, ;
kirielejs.

'3 Dum Ev' laboradis kaj
Adam', ; kirielejs, ; Nobel' kie
estis do tiam? ; kirielejs.

'4 Nun abatejojn trafu pest', ;
heja oho! ; Ni sekvas nur al
Manifest', ; heja oho!

'5 Nin Florjan' Gajer por
repago ; Gvidas al ag'. ; Kun
"ligŝu" sur lia flago, ; Kiras'
kaj kask' en lak'.

'6 Ĉe Weinsberg brul' kaj rab'
okazis, ; heja oho! ; Tre multaj
siajn vivojn lasis, ; heja oho!
.....

'7 Filinon, nobelan ni sen per',
; heja oho! ; Abismen' sendis
al infer', ; heja oho!

'8 Venkitaj iras ni hejmen je
fin', ; heja oho! ; Pli bone
nepoj finos ĝin, ; heja oho!
.....)

& Major' Brak':

< Ripete 48 sed rekante 8 el 64 batoj por strofo, entute 512 paŝoj dum 6 minutoj. El sveda tradukis Martin Strid (2016).>

(#Melodio:

<:4> (

DoRe /Mi Mi MilRe MiFa /So o Mi; (#Rekantaĵe: FaMi /Re Re
Re DoRe /Mi ilDo Do;) DoRe /Mi Mi MilRe MiFa /So ldo So; Fa
/Mi Mi Re Re /Do o o; DolMi /So So La La /So o o; DolMi /So
do Fa Fa /Mi i lRe; DoRe /Mi Mi MilRe MiFa /So ldo So o;Fa
/Mi Mi Re Re /Do o o

)×8)+

(& Strofoj:

'1 (': Major' /Brak' mili2ton
i/rontis,) (×;; **Mili /tamtam
tam, mili/ti2stoj** ;) (': Major'
/Brak' mili2ton i/ro2ntis, ;) (':
vo/jaĝis de l' e/dzin'.) (,;;
Vo2/jaĝis de l' e/dzin', ;
vo2/jaĝis de l' e/dzi2n', Major'
/Brak' mili2ton i/ro2ntis,
vo/jaĝis de l' e/dzin'.)

'2 "Mi venos re ĝis pasko,
aŭ certe somermez'."

'3 Kiam pasko preterpasis
major' Brak' ne venis re.

'4 La edzin' eliris rigardi,
ŝi staris sur alta mont'.

'5 Jen fraŭlon veni ŝi vidas
vestitan en funebr'.

'6 "Forprenu oran skarlaton,
..... major' Brak' mortis en
milit'."

'7 Major' Brak-on portis al la
tombo altrangaj viroj kvar.
.....

'8 Unu portis la blazonon, ;
**Mili tamtam tam, militistoj ;
La dua portis la glaveton** ; kaj
portis du lin mem. ; Kaj portis
du lin mem, ; kaj portis du lin
mem. ; Unu portis la blazonon
; kaj portis du lin mem.)

& Balado pri maltima formiko:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 518 paŝoj dum 5 minutoj. Norda Kantaro #4497. Verkis kaj komponis Stefan Demert (1970). El sveda tradukis Martin Strid (2011) kaj per disdivido de strofoj donis en la melodio lokon por nova rekantaĵo (2015).>

(#Melodioj:

<:37> (

/mimi dodo mimi dodo; SoSo rere fafa re; SoSo rere fafa rere;
SoSo dodo mimi do;

(#Rekantaĵe: dodo fafa lala fafa; dodo mimi soso mi; rere fafa
rere; SoSo mimi soso mi; re emi fare Tire do o;)

)×14)+

(&Strofoj:

'1 /Mi sonigi volas liron ;
kvankam estas nur gitar' ; kaj
rakonti serĉan iron ; de
formiko al pinglar'.

(×:; **Dancu per la ses piedoj ;
Dancu paŝon post la paŝ' ;
Ĉiun paŝon kredu ; kaj ne
metu ĝin en maŝ' ; Dancu
paŝon post la paŝ'.**)

'2 Li matennebulen kuris ;
post fortrink' de ĉokolad' ;
vakcinian vepron spuris ; ĝoja
en kontenta sat'.

'3 Estis longa vojo lia ; vagi al
proksima pin', ; malaperis de l'
aliaj ; tamen ĝoja tenis sin.

'4 Kvindek metrojn de la nesto
; ĝuste dum la sunsubir' ; li
pinpinglon trovis restan ; tute
laŭ sia dezir'.

'5 Por ĝin levi li per forto ;
devis streĉi sin kun pen' ; kaj
komencis la transporto ; de la
bela pinglo jen.

'6 Post kvar horoj da cirkulo ;
venis al bierbotel' ; ĉion vidis
tra nebulo, ; brusto balgis pro
anhel'.

'7 Ĝin sabate iu ĵetis ; Mi
seniĝos je soif' ; pensis li, la
ŝarĝon metis ; kaj engrimpis
en l' edific'.

'8 Li fortrinkis lastan guton ;
el biera katafalk' ; kaj sin batis
kiel bruto, ; kriis He mi estas
alk'.

'9 Eĉ ne pinglon mi hejmtiros ;
ne, nun estos da perturb' ; el
arbaro mi foriros ; ĥaosigos en
la urb'.

'10 Sed li tien ne alvenis ;
baris io sur la pad' ; la
formikon halto ĝenis ; pro
giganta barikad'.

'11 Ĝi teruris al rigardo, ; estis
granda griza mas' ; la formiko
vokis Ardon, ; se malhelpas vi
al pas'.

'12 Li atakis ĝin kolere ;
etenditan en la vast' ; sed
fiksiĝis malliberen ; kvazaŭ en
glueca past'.

'13 Triste finas nun ĉi kanto ;
per formika streba bat' ; sed
lin tenis la giganto ; ĝis li
mortis pro malsat'.

'14 Alkoholon ne impliku ;
spita vi inertos dum ; se
naskiĝis vi formiko ; ne batalu
kun maĉgum'.



& Krioj de l' mizero:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 522 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Julio Baghy. Baladigis Martin Strid (2015) per modifeto de popolmelodio el sveda paroko Orsa kaj parte nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:29> (#Forslunds:

(/Mi MiMi DoMi SoSo; SooFaFa ReFa LaLa; La dore doTi SooTi;Ti reTi domi mimi;)

?

(/Mi DoMi SoTi reeTi;Ti domi mimi mimi; relmi reTi SoTi reeTi;Ti domi mire mimi;)

(#Rekantaĵe: Mi dodo mire dooTiTi LaSi LaTi dodo; TiSo La La; FaMi ReRe Mi Mi i)

)×18)+

(&Strofoj:

'1 /Vi loĝas en palaco, ; mi — en mizera ĉambro; min kovras ŝvit' de laco, ; freŝigas vin — la ambro.

(×:; **Aj, ŝiros mi la maskon de vi, ho hipokrito ; kaj vi hontos ; kiam veron frontos.**)

'2 Ornamas vin la oro, ; virinon vian — gemoj; muelas min doloro ; kaj de l' edzin' la ĝemoj.

'3 Konservas vian sanon ; nektaro de la fablo; satigi min — eĉ panon ; ne havas mia tablo.

'4 Senzorge luksajn vestojn ; infanoj viaj portas; malsato la intestojn ; de miaj idoj tordas.

'5 Predikas vi pri justo, ; perforton vi malbenas, ; dum ftizon en la brusto ; mi venki vane penas.

'6 Kaj tamen, se riproĉo ;
ribelas el korfundo, ; tuj
tondras via voĉo: ; "Vipbaton
al la hundo!"
'7 Ekhaltu la vipbato! ;
Rigardu la mizeron, ; per kiu
senkompato ; plenŝutis jam la
teron!
'8 Ho venu en la domon! ; Ho
venu por minuto ; ekvidi min
la homon ; en stato de l' jug-
bruto!
'9 Pasigu nur momenton ; en
ranca sfer' de l' putro! ;
Gustumu seban lenton ; de la
vomiga nutro!
'10 Kaj trinku el la poto ; la
akvon de la pesto! ; Baraktu
en la koto ; sur mia pajla
nesto!
'11 Rigardu la mienojn ; de la
idaĉoj favaj! ; Karesu la
ekzemojn ; de vangoj
pusohavaj!
'12 Al brusto ilin premu ; por
unufoja kiso ; kaj el la lipoj
prenu ; spirajon de la ftizo!

'13 Kaj poste, se vi povas, ;
nin draŝu per la vipo, ; ĝis
kiam nin ni movas ; kaj
mortos ve' sur lipoj!

'14 Sed ne prediku ordon, ;
nek juston de l' socio ; kaj
ŝparu nuran vorton ; pri helpa
man' de Dio!

'15 Nin draŝu ĝis mortfalo, ;
— sufiĉas jam la luktoj — ;
ĉar nia vivregalo ; nur estas
verm' el fruktoj!

'16 Plenumu vian arton, ; — ĝi
ĉiam vin amuzas — ; se doni
rajtan parton ; el vivo vi
rifuzas!

'17 Sed faru tuj la taskon, ; kaj
finu sen hezito, ; ĉar ŝiros mi
la maskon ; de vi, ah,
hipokrito,

'18 kaj pentros sen kompato ;
sur mia pala vango ; la rozojn
de l' venĝbato ; per — via
propra sango!)

& Mia nomo ne gravas:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 522 paŝoj dum 6 minutoj. Kanton verkis kaj valson komponis Mikaelo Bronŝtein. Per melodio kaj rekantaĵo de Bresta balado kaj disduigante strofojn baladigis Martin Strid (2015). Klarigo (*): '8 Sovetunia esperantista junulara movado. '10 Angle fraŭlino.>

(#Melodio:

(#Valso: <1,0:> o;DoDo /DoDodo La So oMiMi /FaMiRe Do o o;dodo /dodore midoo o ododo /doSodo So o o;;dodo /dodore mi do ododo /doLado So o o;DoDo /DoDodo La So oMiMi /FaMiRe do o)

?

(# Bresta balado: <1,5:29>

doTi /reedodo doTi TiLa /La LaMi La; LaTi /dooTiTi TiTi TiTi /Ti Tire do;

(#Rekantaĵe: TiLa La SiLa Ti La; LaaLaLa La3Mi So3So Fa3Mi; MiiMiMi LaTi do Ti La a)

)×18)+

(&Strofoj:

'1 Mia /nomo ne gravas, mia /aĝo – des pli. ; Nur mo/destan kanteton mi pre/zentos al vi.

(&Bresta: (×:; **Paŝu gajan la dancon ; Brilas aŭroro bele taga ; Venu en alta somertemp'!**))

'2 Mala/peras amikoj en ha/ladzo de l' viv' – ; Nur pri /tio bedaŭras mia /simpla motiv'.

'3 Estis iam aktiva unu nia amik'. ; Lia ventro-melono kreskas nun kun efik'.

'4 Li adoras tagmanĝon, vesper/manĝon – des pli. ; Maten/manĝo abunda estas sankta por li.

'5 Li eĉ aspirantiĝis ŝajnas, ke pro malsat', ; Ĉar pli bonan tagmanĝon havas "la kandidat'".

'6 Lia ĉefo ordonis kun mirinda rigor': ; "Malbenitan lingvaĉon vi forĵetu el l' kor'!".

'7 "Iru for, Esperanto, – li ekploris kun trist'. – ; Povas nun nur doktoro resti esperantist'.

'8 Kiam mi doktoriĝos, mi forkuros el hejm'." ; Pacience atendu la doktoron, ho SEJM*.

'9 En tendaroj aperis simpatia fraŭlin'. ; Ĉiu dua junulo en anim' amis ŝin.

'10 Ŝiaj bluaj okuloj estis vera turkis'. ; Pro agemo kaj belo ni elektis ŝin "Miss"*.

'11 Tamen pasis la tagoj – post gepatra admon' ; Ŝi akceptis proponon de la certa person',

'12 Kiu dum rendezuoj babiladis kun flat': ; "Mia amo – Beethoven kaj ... moderna kravat'."

'13 Iam lernis l' germanan li en la institut'. ; Kaj memoras ke "bone" ŝajne estas "sehr gut".

'14 Tiom certe sufiĉas en la certa medi'... ; Plu l' knabin' ne aperas en tendaroj kun ni.

'15 Daŭri kanto simila certe povas sen fin'. ; Sed, "ĉu estos moralo?" – tuj demandas vi min.

'16 La moralo aperos – mi ne miras pro l' pet' – ; Ni kutimis ricevi sencon sur teleret'.

'17 Ni kutimis pardoni, se amik' sen hezit' ; Oferadas la sentojn por trankvil' kaj profit'.

'18 Malaperas amikoj en haladzo de l' viv' – ; Nur pri tio bedaŭras mia simpla motiv'.)

& Dekdumejla arbar':

< Ripete 24 sed rekante 8 el 41 batoj por strofo, entute 533 paŝoj dum 5 minutoj. Norda Kantaro #4490. Popolkanto el Vestmanlando, notita de Rosa Vretman en la gazeto Runa, 1845. Eldonis Richard Dybeck, kiu je ĉi melodio verkis la nacian himnon de Svedajo. El sveda tradukis Kukoleto (-IORe). Klarigoj (*): '1 La dekdumejla arbaro estas Långheden, provinclima sovaĝejo inter Vestmanlando kaj Dalekarlujo. '3 Kristane, oni sonorigas por ke mortintoj povu atingi en la dian ĉielon. '5 Tej = tie. '6 En nordeŭropa tradicio, mortintojn oni enfosas en teron.>

(#Melodio:

<1,8:4> (

mi /mi dodo do remi /mi redo Ti h;re /re Tido reTi mido /La a So h; /do doore Ti ildo /LaaSo LaaTi So h;So /dolTi dore mido fami /re e do h;So /dolTi dore mido fami <:5> /re e do o

)×13)+

(&Strofojn:

'1 Do /rajdas mi tra dekdumejla arbar'* ; dum /dormis ja dolĉe la a/liaj ; /Tra lale ra2, /trala le2 ra ; dum /do2rmis ja dolĉe la a/liaj ; dum /do2rmis ja dolĉe la a/liaj.

'2 Kaj /rajdas an/taŭen mi /io2m /pli ; (, : ek/aŭ[das mi] so/nori sono/ri/lojn)

(×; /Tra lale ra2, /trala le2 ra ;)

(, : ek/aŭdas mi so/nori sono/ri/lojn ;)×

'3 /Bonan ta[gon, so]no/risto2j, /vi ; por /ki[u so]no/rigas ĉi so/no/ron?*'

'4 Ni /sono/rigas por ju/nule2s
/in' ; ŝi /iros en /te2ron por
/dor/mi

'5 Kaj /rajdas mi /antaŭen
/io2m /pli ; tej* /staris fo/sistoj
du fo/san/taj

'6 /Bonan /tagon, fo/sisto2j, /vi
; por /kiu ĉi /tiun tombon
/fo/sas?*

'7 Ni /fosas /ĝin por ju/nule2s
/in' ; ŝi /iros en /te2ron ri/po/zi
.....

'8 Kaj /rajdas mi /al mia
/bopatra /kort' ; [kiu] /estis
an/taŭe roze /ru/ĝa

'9 U/nue de/mandis mi /pri
ama/tin' ; kaj /poste bo/patron
kaj bo/pa/njon

'10 Kaj /venas mi /ene2n
/io2m /pli ; Du /staris, ŝin
/to2mbove/stan/te

'11 Mi /kombas je /mia
bel/flava ha/rar' ; kaj /volis ŝin
/sekvi en la /tom/bon

'12 Kaj /la junu/linoj sin
/metis en /rond' ; kaj /diris,
e/lektu mi a/li/an

'13 Kna/bino /tia2, /ki[a est]is
/ŝi ; en /reĝlandoj /se2p ne
tro/ve/blas

& Ĉiu vir' havis piedojn:

< Ripete 31 sed rekante 25 el 43 batoj por strofo, entute 559 paŝoj dum 6 minutoj. Norda Kantaro #4114. El norvega tradukis Kukoletto (1993 FLRE) kaj verŝajne ankaŭ verkis (strofojn '4-13).>

(#Melodio:

<1,7:3> (

/LaTi do TiLa /do Ti i; /La do TiLa /Ti Ti i; /LaTi do TiLa /do Ti i; /LaTi do Ti /La La a; /do Ti i; /dodo Ti i; /dodo Ti Ti /dodo Ti i; /LaTi do TiSi /LaLa La a; /h;

)×13)+

(&Strofoj:

'1 /Ĉiu vir' havis /[pie]dojn ;
/mia viro ne/niun ; /Prenis mi
alnar/bedojn ; /por li faris
/[pie]dojn ; /Mia vir' ; /danca
ir' ; ar/bedopiedojn /laŭ akir' ;
/same kiel a/lia vir'./

'2 (×: **Ĉiu vir'**) (': havis
brakojn ;) (×: **mia viro
neniun ; Prenis mi**) du
korakojn (×:; **por li faris**) (:
brakojn) (×:; **Mia vir' ; danca
ir' ;**) korakobrakojn (×: **jen
akir' ; same kiel alia vir'.**)

'3 o okulojn du
kapsulojn kapsulokulojn
.....

'4 havis manojn
ŝafkalkanojn ŝafomanojn
.....

'5 o orelojn arboŝelojn
..... ŝelorelojn

'6 havis nazon
ŝenoprazon ajlonazon

'7 havis buŝon
viandmuŝon muŝobuŝon
.....

'8 havis lipojn
ĉevaltripojn tripolipojn

'9 havis fingrojn
fajrocindrojn
cindrofingrojn

'10 havis ungojn
muŝofungojn fungoungojn
.....

'11 havis kolon ja
tremolon koltremolon

'12 havis krurojn
ledoŝnurojn (×:; por li faris)
kurojn (×:; Mia ĝu' ; dancos
plu ;) ŝnurokurojn (×: atribu' ;
same kiel alia gru'.)

'13 havis kacon
virboacon (×:; por li faris)
kacon (×:; Mia kor' ; dancas
for ;) boacokacon (×: sen
dolor' ; same kiel alisinjor'.))

& Eta Mazgrev:

< Ripete 0 el 16 aŭ 4 el 20 batoj por strofo, entute 448 paŝoj dum 5 minutoj aŭ 560 paŝoj dum 7 minutoj. El angla tradukis William Auld.>

(#Melodio:

(

(# Sen ripeto: <:2>

(o;Mi /SoSo SooSoSo /FaMi Fa3;So /doSo SoFa /So o;So /SoSo SoSo /FaMi Fa;So /doSo FaMi /Do)

?

(o;do /dodo dore /milredoo So3;do /redo doFa /So o;do /dodo dore /redo So3;do /doSo FaMi /Do)

)

?

(# Kun ripeto: <:2> a;mi /mimi mimimi /redo re;la /lami mire /mi i;la /lami mimi /redo re;la /lami mire /mi i;mi /lala tiillaso /la)

)×28)+

(& Strofoj:

'1 O/kazis foje en /iu tag' ;
sam/kiel dum la /jar' ; ke
/gvatis Mazgrev /ĉe l' preĝej'
(; pri l' /bela viri/nar'.)×

'2 Vestiĝis kelkaj en velur' ;
aliaj en la lan' ; kaj lasta venis
Barnardin' ; plej bela paroĥan'.

'3 Rigardis Etan Mazgrev ŝi ;
kun hel' de somera sun' . ;
Ekpensis Eta Mazgrev, "Nu, ;
lordin' min amas nun."

'4 Saluton, juna bela vir', ; vin
prosperigu Di', ; por unu nokt'
en mia lit' ; oferus kion vi?"

'5 Mi ĝin ne riskus, sinjorin', ;
pro l' vivo kaj bien'. ; De
Lordo Barnard estas vi ; l'
edzin', laŭ ringo jen."

'6 "Ĉasadon iris mia lord', ;
prefere sen reven', ; kaj
dormos vi en lia lit' ; en mia
ĉirkaŭpren'.

'7 Ho Mazgrev, timon lasu for,
; nenia kaŭz' por tim', ; ĉar
eksterporde ĝis maten' ; paĝio
gardos nin."

'8 Suferu la paĝio tre, ; li
mortu en turment', ; ĉar al l'
arbaro verda li ; rapidis kiel
vent'.

'9 Kaj alveninte al l' river' ; li
naĝis ĝis transa bord' ; kaj
aliflanke de l' river' ; li kuris al
sia lord'.

'10 Veninte al l' arbara verd' ;
li serĉis en mallum' ; kaj trovis
Lordon Barnard jam ;
dormanta sub arbtendum'.

'11 "Vekiĝu, mastro, veku vin,
; aŭskultu al la dir': ; kun
Mazgrev dormas via edzin', ;
jam urĝas la ekir'!"

'12 "Se via diro estas ver' ; mi
pagos per oraĵ' ; kaj se ĝi
falsas, pendos vi ; en
pendumila maŝ'.

'13 Ĉevalon mian selu tuj," ; li
diris, "la nigran jen! ; Ne
blovu kornojn," diris li, ;
"senavertu la alven'."

'14 De lordo Barnardo unu
kunul' ; al Mazgrev amikis tre.
; Li blovis laŭte per sia korn': ;
"Ho Mazgrev, forkuru, ve!"

'15 "Ho, mi aŭdas kokon de l'
maten' ; kaj garolon ĵus, ĉu
ne? ; Mi aŭdas kornon de
Barnard: Ho Mazgrev',
forkuru, ve!"

'16 "Ho, kuŝu, Mazgrev, en
trankvil', ; min ŝirmu de
frosteg', ; nur paŝtisteto estas
ĝi ; kun sia ŝafa greg'.

'17 Surstangas via akcipitr', ;
la ĉeval' fojnumas nur: ; Jen
vigla damo en brakum' ; kaj vi
pensas pri forkur'?"

'18 Do li turnis sin kaj turnis
sin ; kaj ekdormis sen singard'
; kaj lin apudis je l' vekiĝ' ;
soldatoj kaj Barnard'.

'19 "Kaj kiel plaĉas mia lit' ;
kaj mia litkovril'? Kaj kiel
plaĉas mia dam' ; dormanta en
trankvil'?"

'20 "Tre bone plaĉas via lit' ;
kaj via litkovril' ; kaj pleje
plaĉas via dam' ; dormanta en
trankvil'."

'21 "Junul', leviĝu," diris li, ;
"Rapidu iom pli, ; ĉar
nearmiton dum la viv' ;
neniam mortigis mi.

'22 En unu ing' mi
multekostajn ; glavojn havas
du: ; Pli bonan vi, malpli
bonan mi, ; ekprenos por
detru'."

'23 Do lante, lante leviĝis li ;
kaj vestis sin sen vort' ; kaj
lante iris tra l' ŝtupar' ;
pensante pri la mort'.

'24 Pro l' unua bat' al Mazgrev
jam ; apertis sanga tru' ; kaj
antaŭ Barnard falis li ; kaj
silentis ĉiam plu.

'25 Ĉu plaĉas liaj vangoj, ; ĉu
l' mentonoj plaĉas, dam'? ; Ĉu
plaĉas lia korpo ; kiam
mankas vivoflam'?

'26 Ŝi diris: "Plaĉas lia vang', ;
la mentono plaĉas jam ; kaj
plaĉas al mi lia korp' ; pli ol
via tuta klan'."

'27 La longan glavon prenis li
; por frapi kun fatal': ; La
koron de la sinjorin' ; trapikis
frida ŝtal'.

'28 Okazis foje en iu tag' ;
samkiel dum la jar' ; ke gvatis
Mazgrev ĉe l' preĝej' ; pri l'
bela virinar'.)

& La monten prenita:

< Rekante 12 el 27 batoj por strofo, entute 567 paŝoj dum 6 minutoj. Norda Kantaro #4412. El sveda tradukis Kukoleto (1993 FIO-e). Klarigoj (*): '2. La monta reĝo estas supernatura, timata estaĵo, ore tre riĉa, kiu loĝas en la monto, interne en la roko. '13. Lilia vango: bele blanka vizaĝo.>

(#Melodio:

(

;hMi <:2>/La mire /dodo TiLa /do rere /mi ih; /dodo Tire /do h;mi /mildo domi /somi dolmi /reeTi SoTi /re h;re /mi doLa /do TiSi <:3>/La ah

)×21)+

(&Strofoj:

'1 Ma/tenkanten /estis virgu/lino i/ront' ; /Longas al mi /temp' ; Kaj /i2ris la /vojon ŝi2 /al la alta /mont' ; Mi /scias ke /pezas mal/ĝo/j'.

'2 Ŝi /frapis per la /etaj fingroj /sur la monta /pord'

(×:; /Longas al mi /temp' ;)

"Ek/staru, alta /monta reĝo*, /tiru riglojn /for!"

(×:; Mi /scias ke /pezas mal/ĝo/j'.)

'3 Kaj /staris ek la /monta reĝo, /tiris riglojn /for kaj /portis nove/dzinon al /blua silka /lit'

'4 Ŝi /enis la /monton dum /jaroj tutaj /ok Sep /filojn ŝi /naskis kaj fi/linon en la /rok'

'5 Kaj /antaŭ montan /reĝon stari /iras junu/lin' "Min /lasu iri /hejmen al /mia pa/trin'."

'6 "Vi /iru al /via pa/trino en la /hejm' sed /diru ne/nion pri in/fanoj la /sep."

'7 Kaj /kiam ŝi /venas al pa/trina bi/en' /staras antaŭ /ŝi la pa/trino bona /jen

'8 "Kaj /kie vi /estis dum /tiel longa /temp'? Vi /estis, ĉu

- /ne, en la /roza klina /kamp'?"
.....
- '9 "Sed /ne estis /mi en la /roza klina /kamp' En /monto mi /estis dum /tiel longa /temp'
.....
- '10 En /monto mi /estis dum /jaroj longaj /ok kaj /naskis sep /filojn kaj fi/linon en la /rok."
- '11 En/paŝis la /monta reĝo /tra la doma /pord' "Pri /mi kial pa/rolas vi per /multmalbona /vort'."
- '12 "Ne/niel mi pri /vi parolis /per malbona /vort' sed /pri la bono /kiun spertis /mi en via /kort'."
- '13 Kaj /batis li /ŝin sur /pala lili/vang'* kaj /sur la belan /ŝnuran jupon /ŝprucis la /sang'
.....
- '14 "Vin /metu trans la /pordon ra/pide, fia /hom' ne/niam vi re/venos al /via patrin/dom'."
- '15 "A/diaŭ, kara /patro, a/diaŭ bona /panj' a/diaŭ, kara /frato, a/diaŭ kara /franj'
- '16 A/diaŭ, ĉiel/alto, a/diaŭ, verda /ter' nun /iras mi al /monto, kie /loĝas monta /reĝ'."
- '17 Do /rajdis ili /trans malhela /longa ar/bar' Ri/detis monta /reĝo, ŝi /ploris en a/mar'
- '18 La /monton ses/foje ĉir/kaŭis la /du Sin /pordo mal/fermis, ili /paŝis en /tru'
.....
- '19 /Ruĝan or/seĝon el/metis la fi/lin' "Mal/ĝoja /panjo, ri/pozu jen /vin."
- '20 "Mi/elbierajn /glasojn ve/nigu per /port' El /ili trin/kigos mi min /mem al la /mort'."
- '21 l' u/nuan ŝi /trinkis el /glasoj da /flor' Fer/miĝis l' o/kuloj, kaj /krevis la /kor')

& La kampulo kaj la korniko:

< Maĵora rekante 16 el 32 batoj por strofo, entute 576 paŝoj dum 7 minutoj. Minora rekante ripete 11 sed rekante 9 el 19 batoj por strofo, entute 342 paŝoj dum 4 minutoj. Norda Kantaro #4448. Satiro pri la jam delonge altaj impostoj, kiujn en fruaj epokoj kolektis reĝaj inspektistoj ("feŭdoj"). Du diversaj melodioj kaj rekantaĵoj sed cetere sama teksto. El sveda tradukis Kukoletto (1993 --oRE). Klarigoj (*): '1,9 Kva = kiu. '17 Als = tiel, ke ĝi poste estas.> >

(#Melodioj:

((#Maĵora: <2,5:4> /Do MiSo Do MiSo /Mi So do o; /La Fa La do /SoSo SoFa Mi i;So /Fa FaLa Re ReFa /Mi So Do o;/Re Re Fa TI /ReDo DoDo Do o;)

?

(#Minora: <1,4:> ;/LaLaLa LaLaLa /miimi mi; /faaso faami /reldore mii;mi /doremi doremi /reeTi doodo; /TiiSo La /Laami milredo /TiiSo La a;)

)×18)+

(&Strofoj:

'1

(&Maĵora:

/Iris kampulo en /pinarbar'

(×:; /**hejom fejom /fale rale ra ;)**

li /vidis kornikon kan/tantan klare

(×:; /**hejom fejom /fale rale ra.))**

?

(&Minora:

/Iris kampulo (': en /pinarbar')

(×:; /**falu lej,**)

(': en /pi2narbar' ;)

li /vidis kornikon kva* /kantis klare

(×:; /**Falu lej, /fale lu2le /lulan lej/.**)

'2 Ektimis kampul' kaj rekuris
al bien' "Aj, panjo, min
mordos korniko jen!"

'3 Ŝpinis l' ulino ĉe sia ŝpinrad'
..... "Ĉu homon atakus kornik'
per mordad'?"

'4 Streĉis pafarkon kampul'
per genu' li pafis kornikon
en altsitu'

'6 Venis mesaĝo de l'
inspektist' "Vi pafis
kornikon el kia konsist'?"

'7 "Kornik' en la dom' estas
pro mia streb' da kandel'
dek du funtojn mi faris el seb'
.....

'8 El plumoj por ĉiu lito
kusen' eĉ por servistaro
sufiĉis la ben'

'9 Ventumilojn el flugilpluma
afer' kvajn* uzos knabinoj
dum bela veter'

'10 El beko preĝejan turpinton
por fest' ni faris
preĝejturan kokon el krest'

'11 Knedujon ni faris el ĝia
krani' ne estis pli granda
dum homhistori'

'12 La kolo korniĝis por sona
blov' ĝi sonis pli forte ol
grandulbov'

'13 Ŝuparojn dek du el ĝia
stomak' restaĵon ni faris
als granda sak'

'14 Intestoj fariĝis dekducola
ŝnur' forkego por sterko el
ĉiu krur'

'15 La viando metiĝis en
tinojn kun sal' krom steko
acida, por paĉjo regal'

'16 Ni faris velŝipon el ĝia
ripar' plej grandan velintan
sur nia mar'

'17 Postaĵon mi faris als*
kudrista ring' korniko por
ni estis bona ating'."

'18 Do kantu la kanton ajnulo
laŭ plaĉ' nenion forprenu
pro l' impostaĉ')

& Eŭropo:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 580 paŝoj dum 7 minutoj. Poemon verkis Nikolao Hohlov (La tajdo, 1928). Baladigis Martin Strid per disduigi strofojn kaj versojn kaj doni melodion kaj rekantaĵon de Bresta balado, Norda Kantaro #4408.>

(#Melodio:

<1,5:29> (

/dolTi re3do doTi TiiTi;Ti La3La LaMi LaaLa;La LaTi doTi Ti Ti3;Ti TiTi Tire dodo;

(#Rekantaĵe: TiLa La SiLa Ti La; LaaLaLa La3Mi So3So Fa3Mi; MiiMiMi LaTi do Ti La a)

)×20)+

(&Strofoj:

'1 /E2l nekonataj, ŝlimaj ;
abismoj de l' animo ; Mi aŭdas
strangan bruon, ; en
malgraŭvola timo,

(×:; **Paŝu gajan la dancon ;
Brilas aŭroro bele taga ;
Venu en alta somertemp'!**)

'2 Ĝin trapenetras krioj, ;
kaŝitaj dum miljaroj, ;
Grincado de la dentoj, ;
metalo de fanfaroj,

'3 En ĝi stertoras veoj, ;
lamentas ploristinoj, ;
Tamburas ŝmacajn hakojn ;
falintaj gilotinoj,

'4 Susuron flirtas flustre ;
truita silk' standarda ; Kaj ĉion
fonas kraka, ; reeĥa boj'
bombarda... ..

'5 Analojn, postlasitajn ; de
gentoj kaj prauloj, ; Mi sentas
en angoro ; tra tempoj kaj
nebuloj,

'6 Antikvaj krimoj pete ; al mi
etendas manojn ; Kaj
forĝesitaj lingvoj ; malbenas
la tiranojn,

'7 Haladzon spiras bruta, ;
mensoga kaj maldanka ; La
tuta historio ; de mia raso
blanka,

'8 Nur kelkaj epizodoj, ; nur kelkaj bravaj voĉoj ; Surlumas tiun muĝon ; de l' murdaj sangdiboĉoj,

'9 En ili ĝermas savo, ; en ili – la lumturoj, ; Pro ili solaj palas ; vizio de l' teruroj,

'10 Nur sur iliaj ŝultroj ; atlantaj de l' kelkopo ; Sekure kuŝas sorto ; de l' krimulin' Eŭropo.

'11 Nur pro ilia sango, ; oferoj kaj ĉagreno ; Retrovas la honoron ; la pala Magdaleno,

'12 Por naski novan idon, ; en la feliĉaj larmoj, ; Mesion liberigan ; de la katenaj armoj... ..

'13 Aŭskultu do, Azio, ; mamnutristino nia, ; Afriko sfinkse muta, ; tribar' Oceania,

'14 Ĝemela kontinento ; de l' ambaŭ Amerikoj, ; Kunfratoj de l' estonto ; kaj dumaj malamikoj.

'15 Aŭskultu kaj konfidu ; la jam proksiman horon, ; En kiu nova sango ; trafluos nian koron

'16 Ankoraŭ kelkaj limoj, ; hezitoj kaj decidoj – ; Kaj kun la mirtaj branĉoj ; pilgrimos blankaj idoj,

'17 Kuraci viajn vundojn ; kaj super la cikatroj ; Trasenti la hontigan ; brutecon de la patroj,

'18 Starigi novan mondon ; de l' paco kaj libero, ; Proklami la Laboron ; reĝino de la tero... ..

'19 Tempestas la mistikaj ; abismoj de l' animo, ; Sed jam vidiĝas lumo ; en nova malproksimo

'20 Obee donas vojon ; laciĝo kaj miopo ; Al kredo de l' estonto ; de la patrin' – Eŭropo.)

& Iras abiturient'....:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 580 paŝoj dum 7 minutoj. Poemon verkab Kálmán Kalocsay (Mondo kaj koro, 1921) baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo de Balado de Virgar, Norda Kantaro #4406, kaj adaptoj de ritmo en strofoj '8-10 kaj '18-20.>

(#Melodio:

<1,6:29> (a;La /MiLa LaTi TiTi do;re redo doTi TiiMi;Mi LaLa TiTi TiTi do;re redo doTi LaTi;

(#Rekantaĵe: do TiLa So Ti Mi LaTi do do;Mi So SoFa Mi La;Ti doTi La)

)×20)+

(&Strofoj:

'1 En splena sent', ĉagrena sent' ; Jen koron ekkaresis ; Arĝentsonor' de l' rememor' ; Pri l' tempoj, kiuj ĉesis.

(×: **Nun emas mi en danco jam iri ; dum rozoj, lilioj ; kreskadas tre.**)

'2 Ĝojriĉa temp', feliĉa temp' ; De l' knab' facilanima, ; Ho vivabund' en kora fund': ; Viv' estas ja senlima...!

'3 Senpena sort' kaj plena fort', ; Amika rondo varma, ; Kortuŝa fid', plenbuŝa rid' ; Pri ia farso ĉarma.

'4 Ho ora viv', ĝojflora viv', ; Flugiloj ĝoj-frapantaj, ; Malĝoj' kaj dub': facila nub'... ; Projektoj dolĉe vantaj,

'5 Studenta temp', ho venta temp': ; Aĝ' de l' printempa vento! ; Ag' de April': en blanka bril' ; Burgonas knabo sento.

'6 Naiva am': soifa jam ; Je kis' la lipo estas ; Kaj la admir' per fabla mir' ; La amatinon vestas.

'7 Naiva poz': do, sen ripoz', ;
Nur supren sur deklivo! ;
Infana songĝ', ho, vana songĝ', ;
Ĉar vekas zorg' de l' vivo... ..

'8 Re2portu bri2lo2n ; al la
malĝojanto ; Ma2lnova,
ka2ra2 ; kant', adiaŭkanto:

'9 Iras abiturie2nt' ; – Ja4m
for. ; Adiaŭ, ĉiu
kunstude2nt'...! ; – Ja4m
fo2r...

'10 La voj' al hejm' jen antaŭ
mi, ; Filistro estos an[kaŭ mi].
; Ja2m fo2r... ja2m for... ; Ni
ki[su nin je] lasta fo2j'.

'11 Infana songĝ', ho vana
songĝ', ; Ĉar vekas zorg' de l'
vivo. ; Kaj svenas ĝoj' kaj
venas voj' ; Malsupren sur
deklivo.

'12 En truda dev' la fluga rev',
; La songa mond' ekpalas, ;
Flugila sving' sen cel-ating' ;
Lamiĝas — kaj ni falas.

'13 Nenie sav'... Nek ama rav'
; Nin helpas por leviĝo. ; Ĉar
ĝenas nin, ke venas fin': ; Aŭ
tromp' aŭ senreviĝo.

'14 Amika rond'... Ĝin portas
ond' ; Malpura: lukt' por vivo.
; Malam', malpac', barakt' kaj
lac' ; Envio, monsoifo.

'15 Kaj post esper' la
malprosper' ; Eterna kaj rigida
; Splenigas nin, plenigas nin ;
Per saĝo tre acida:

'16 Por kio lukt': acida frukt' ;
Ja estas la espero ; Kaj ĝi de
sur ; branĉ' sen matur', ;
Defalas al la tero.

'17 Do lasu nur: viv' pasu nur,
; Ĉar estas ver' ordona, ; Ke
estas mond' kaj restas mond' ;
Malĝoja kaj malbona.

'18 Ho plo2ru2, plo2ru2 ; kun
la ekploranto ; Ma2lnova,
ka2ra2 ; kant', adiaŭkanto:

'19 Iras abiturie2nt' ; – Ja4m
for. ; Adiaŭ, ĉiu
kunstude2nt'...! ; – Ja4m
fo2r...

'20 La voj' al hejm' jen antaŭ
mi, ; Filistro estos an[kaŭ mi].
; Ja2m fo2r... ja2m for... ; Ni
ki[su nin je] lasta fo2j'.)

& Infanoj de zorgo:

< Rekante 27 el 49 batoj por strofo, entute 588 paŝoj dum 6 minutoj. Verkis Gerder?. El ? tradukis? Vasilij Devjatnin (Verkaro de V. N. Devjatnin, Hachette, Parizo 1906). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,7:49> (

/do SoSo do re Tido rere; mi dodore fa redo TiSo; do SoSo do re Tido rere; mi dodore fa laso fami;

(#Rekantaĵe: re Tido reTi mi do; re Tido reTi mi do LaLa So; : re Tido reTi mi do; re Tido reTi mi do LaLa So Ti do o)

)×12)+

(&Strofoj:

< El Gerder.>

'1 /Finiĝis varmega jam tago, ;
Kaj nokto agrabla fariĝis, ;
Sub ombra cipreso, ĉe lago ;
Diino de Zorgo sidiĝis.

(×: **Dancu ni vigle sur la ;
Dancu ni vigle sur la firma
ter' ; Dancu ni vigle sur la ;
Dancu ni vigle sur la firma
tera grund'.**)

'2 El ruĝa argilo Diino ;
Malgaje figuron skulptadis, - ;
Kaj luno, de nokto reĝino, ;
De blua ĉiel' rigardadis.

'3 Jen Zeŭso al bela Diino ;
Parolis kun dia favoro: ;
"Rakontu, malgaja knabino, ;
Pri via doloro en koro?

'4 "Ho, Zeŭso, Diino rediras: ;
Alportu al mi vi plezuron! ;
De vi mi nur solan deziras: ;
Vivigu vi mian figuron!"

'5 - Volonte! Mi vin
kontentigos: ; Viviĝas figuro
jam via! ; Sed tamen de nun
mi devigos, ; Ke estu eterne ĝi
mia! -

'6 "Ho, ne! Al li Zorgo
parolas: ; Figuron mi longe
skulptadis, ; Al vi mi ĝin cedi
ne volas, ; Ĉar ĝin mi por mi
preparadis!

'7 Por mi ĝin restigu!" korege
; Ŝi Zeŭson potencan admonis.
; - Ho, ne! mi ĝin amas
varmege, ; Al ĝi ĉar animon
mi donis! -

'8 "Pro kio disputon vi tenas?"
; Subite la Ter' al li diras: ; Al
mi ĝi sen dub' apartenas, ; Ĉar
tera en teron foriras!"

'9 Kaj dioj disputis senfine, ;
Ĉar cedi neniŭ deziris ;
Figuron argilan, - sed fine ; Al
Kron' ili ĉiuj ekiris.

'10 "Ĉar unu al dua ne volis ;
Figuron vi tiun-ĉi cedi, -" ;
Grishara Saturn' ekparolis: ;
"Vi kune ĝin povas posedi."
.....

'11 "Aŭskultu-do, dioj: nur
kiam ; Ĝi moertos, anim'
apartenos ; Al Zeŭso potenca,
- kaj tiam ; Jam Ter' ĝian
korpon alprenos.

'12 Kaj vi, ho, de Zorgo Diino,
; Ĝin povas posedi ĝis morto!"
; Mi pensas, ke tia difino ;
Similas al homa la sorto?

& Brulpereo:

< Rekante 18 el 31 batoj por strofo, entute 589 paŝoj dum 7 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Mondo kaj koro, 1921). Baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo de Sigmunda balado (Norda Kantaro, #4409 kaj #4411), redisigante la strofojn als duversaj.>

(#Melodio:

<1,6:31> (/mi mi dolre mi so somi re so;so soso soso fami re fa;
(#Rekantaĵe: mire do; domi mimi re do; rere rere re re; mi mire doTi La; Somi mimi re do)
)×19)+

(&Strofoj:

'1 /Am', artfa2jraĵo milkolora! ; Am', artfajraĵo milkolora! (×:; En la ĉen' ; dancu nun trankvile ; ĉiuj ni trankvilas ; jen en amika ĉen' ; dancu nun trankvile.)	'7 Pri lip-sur-lip', kaj kor-ĉe-koro. ; Ho, pluv' arĝenta, pluv' el oro,
'2 El kor' ekflagras vi subite. ; Mi ekbruligis vin. Ravite	'8 Ho, dolĉaj flamoj roz koloraj, ; Ho, dolĉaj sentoj fajrofloraj
'3 Mi ĝojis pri fajrejoj viaj. ; Espersteletoj verdradiaj	'9 De laŭstudenta am' naiva... ; Sed ruĝo de l' sopir' soifa
'4 Brilante tra l' animo lumis ; Kaj karesante milde zumis	'10 Raketis, falis sur la koron. ; Mi sentis akran bruldoloron,
'5 Pri l' feliĉego alvenonta. ; Kaj el la koro fajrofonta	'11 Mi tamen ludis plu kuraĝe. ; Kaj nun malhele kaj sovaĝe
'6 Flagradis flamo bluehela: ; Revado pri plezur' ĉiela:	'12 Leviĝis en violkoloro ; La pezaj flamoj de l' doloro...

'13 Ektremis mi ĉe l'
ekrigardo. ; Kaj venis kun
bruliga ardo!

'14 Purpur' terura de l' pasio ;
Galopas fajro jam tra ĉio... ..

'15 Mi time miras ĝian
svingon. ; Mi krius jam, ho ve,
estingon!

'16 Brulvundoj veas sur
animo. ; Kaj kreskas jen la
brul' sen limo,

'17 Jam kri' por helpo vane
sonas. ; Stertore mi en flamoj
dronas,

'18 Sangnuboj antaŭ la
okuloj... ; Ve, mi pereas en la
bruloj

'19 (De l' artfajraĵo
milkolora.)×

& Konsiloj al malĝoja amikino:

< Rekante 23 el 31 batoj por strofo, entute 589 paŝoj dum 7 minutoj. Verkis Cezar. Baladigis Martin Strid (2016) per melodio el Transtrand, Svedujo, kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,5:31> (/LaTi dore mimi somi; fimi midi LaLa Lado;

(#Rekantaĵe: Ti So So Tilre do La LaLa; <[la:do]> do do do redo
TiLa SoFa So oLa; SolFa MilRe MilRe DolTi Do lDolRelMi Do
o)

)×19)+

(& Strofoj:

'1 /Lernu vin, ho kara, ŝati, ;
ĉar ne helpas sin kompati.

(×: **Jen ŝanĝiĝo2s via sorto ;
Dancu2 nun kun fiera rekta
dorso ; Je2n ŝa2nĝiĝo2s
vi4a sort'.**)

'2 Se vi estas por vi blinda, ;
mankas memestimo inda.

'3 Ĉar ja estas sed kaj tamen, ;
vi neniam diru amen!

'4 Se necesas, eĉ adultu, ; sed
neniam simple stultu.

'5 Vi ne estu ŝaf' kaj predo ;
aŭ citrona in' aŭ ledo.

'6 Estu freŝa, estu forta, ; se
necesas, eĉ senvorta.

'7 Estu, kiam ajn, kuraĝa, ; kaj
ĉe l' fin' de l' vivo saĝa.

'8 Flugu sola al la Luno, ; brilu
ene kiel suno.

'9 Lernu esti sen modesto, ;
jen la viv' fariĝas festo.

'10 Honesteco ne sufiĉas, ; se
vi tamen sklavo iĝas.

'11 Dependigu vin ne ĉiam ;
kaj se eblas, eĉ ne iam.

'12 Se vi pri vi mem nur
dubas, ; via tuta vivo rubas.
.....

'13 Kara, serĉu al vi celon, ;
serĉu veron, serĉu belon.

'14 Iĝu lerta vivartisto ; kaj
konsciu pri rezisto.

'15 Se vi lernos mem vin ami,
; jen vi scios ankaŭ dami.

'16 Al fiuloj ĵetu ganton, ; Ne
adoru plu la vanton.

'17 Vivu ne nur do por plaĉi, ;
tia vivo devas aĉi.

'18 Spitu do al la postulo ;
plaĉi volas ina nulo.

'19 Se vi ĉion el vi kreos ; kaj
ne plendos kaj ne veos,)

& Signhild Fiera:

< Rekante 15 el 31 batoj por strofo, entute 589 paŝoj dum 7 minutoj. Norda Kantaro #4439. Melodio laŭ feroa danco. El dana tradukis Martin Strid (2014).>

(#Melodio:

<1,5:31> (do /dodo do rere rere soso so mi; do rere re remi fa so o; mi soso so solfa mi fafa fa mi; mire do mi re e do o; h)×19)+

(&Strofoj:

'1 /Signhild Fiera fare miksas da vin', ; – jen bele faladas la ros' – ; invitas ŝi fra²ton hejmen ĉe sin. ; En kirasojn ĉiuj.

'2 Ili donis da med', ili donis da vin',

(×:; – **jen bele faladas la ros'** – ;)

tiom longe, kiom la suno brilis.

(×:; **En kirasojn ĉiuj.**)

'3 Ŝia frato volis rajdi al hejma dom' Signhild Fiera sekvofraŭlojn proponis.

'4 "Per sekvofraŭloj kion mi? Miaj malamikoj estas nun ĉiuj en lit'."

'5 Sed kiam li venis al vilaĝa erik' renkontis li siajn sep malamikojn.

'6 Kaj kiam li venis en densa bosk' pri la malamikoj li devis agnoski.

'7 "Mi petas, miajn malamikojn, el kor', vi lasu min blovi per ora sonor'."

'8 "Vi nian permeson havu konsol', vi blovu sonoron dum via vol'."

'9 Li blovis sonoron, li blovis je fort' aŭdis Signhild Fiera en sia kort'

'10 Li blovis sonoron, li blovis je daŭr' aŭdis Signhild Fiera en lita kaŭr'

'11 Kaj Signhild Fiera vokis en bien' "Mian grizan ĉevalon elgvidu jen.

'12 Mian grizan ĉevalon
algvidu nun, dum sep jaroj
ne vidis li la sunon.

'13 Li sunon ne vidis dum sep
jaroj, dum jaroj dek kvin
ne kun selo staris.

'14 Alportu nun lancon al mi
kaj glavon, dum jaroj dek
ok ilin mi ne havis."

'15 Kaj Signhild Fiera rajdi
urĝe devis, ŝia bona ĉevalo
per tio krevis.

'16 Kaj Signhild Fiera vokis
en anksi' "Respondu min,
frato, se povas vi."

'17 "Ne estas mi ofero nek en
anksi', helpu min fratino,
se povas vi."

'18 Morthakis ŝi liajn sep
malamikojn ŝi portis lin
hejmen en viva fortik'.

'19 Kaj se ili estus du por unu,
..... ŝi donus al ili mortigan
vundon.)

& La kripla Pegazo:

< Rekante 11 el 23 batoj por strofo, entute 598 paŝoj dum 6 minutoj. Verkis K. Kalocsay. Baladigis Martin Strid (2016) per modifo de sveda popolmelodio el Retviko (Rättvik) kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,6:29> (

/do MiFa ReFa Mi DoMi SoSo; So doTi redo do LaFa SoSo;

(#Rekantaĵe: So doTi dore do; LaFa SoFa MiFa SoFa ReTI Do o)

)×26)+

(&Strofoj:

'1 Porko malsata sonĝas pri glano, ; Dolĉajn bombonojn sonĝas infano.

(×: **Li revas pri sukces' ; En la granda mondo regas la forges'.**)

'2 Esperantisto sonĝas pri rimoj. ; Ve, de la sonĝo venas la krimoj.

'3 Krimoj de rimoj, verŝoj de versoj, ; Sur la Parnaso grandaj renversoj.

'4 Fulmas la kapo hirte, senkombe, ; Ĉiu poeto turnas sin tombe.

'5 Kun la Vortaro Sankta de Rimoj ; Li al ĉielaj altmalproksimoj

'6 Rajdas fiere sur la Pegazo. ; Lin bela Muzo gvidas — ĉe nazo.

'7 Svarmas en versoj novaj belecoj, ; Granda amaso el ĉiuj specoj:

'8 Li al la frazoj kolon eltordas, ; Kaj la finaĵojn simple demordas.

'9 Pri la printempo, vintro kaj vento, ; Sepdeksesfoje pri l' Nova Sento,

'10 Pri Ŝi, la Kara, kiun li amas, ; Versoj trumpetas, marŝas — kaj lamas.

'11 Ĉion li movas, ĉion li provas, ; Gloron eternan li por si kovas.

'12 Rompas la ovon, rampas la
ido ; El la ovŝelo — estas ĝi:
rido.

'13 Ĉar ja la homoj, granda
bedaŭro, ; Metas foliojn
sanktajn de laŭro,

'14 Ve, ne sur lian kapon
glornoman, ; Prefere — en la
supon terpoman.

'15 Oni, senhonte, jen, eĉ
kritikas! ; Hoko de moko akre
lin pikas,

'16 Diras kritiko, la
serpentsibla, ; Lian Pegazon
fajra — sed kripla.

'17 Kaj liajn rimojn diras ĝi
surdaj, ; Kaj la ariojn diras ĝi
gurdaj,

'18 Kaj lian voĉon diras ĝi
raŭka, ; Kaj la poeton diras
sentaŭga.

'19 Jes, je l' adreso de la poeto
; Venas sciigo en la gazeto:
.....

'20 "Viaj versaĵoj — havu
kuraĝon — ; Estas tre taŭgaj
— kovri fromaĝon.

'21 Sed post ĉi tiu akra atenco
; Ĉesas jam en li la pacienco
.....

'22 Kaj li eksplodas, kiel per
briko ; Forte batita gala
veziko:

'23 Kiel ekzistus verso ja
bona, ; En Esperanto, la
malbonsona,

'24 Tio ja estis tute malsprita: ;
Versi en lingvo fuŝefarita.

'25 Kaj li riproĉas, plendas kaj
ĝemas, ; Krias, insultas,
muĝas, blasfemas,

'26 Hurlas, malbenas, tondras
sen brido, ; Kaj furioze — iras
al Ido.)